

Unuaj Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 469, 1972.10.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon en raporto pri la ĉisomeraj esperanto-kongresoj ni menciis, ke ni ĉeestis la Somerajn Universitatajn Kursojn en Lieĝo, Belgio.

A.- Hodiaŭ kaj la venontan semajnon ni priskribos tiun eksperimenton kaj analizos kelkajn el ties aspektoj.

Cl.- Tiuj kursoj daŭris dum kvar semajnoj. Ĉiu semajno estis memstara studperiodo. Ni partoprenis la tri unuajn semajnojn.

A.- Tiuj kursoj disvolviĝis en ideala etoso. Ni loĝis en studenta hejmo situanta en vasta universitata bieno. Dum pluraj horoj ni povis promenadi en la arbaro kaj sur vastaj kampoj : ĉiam ni estis en la sama bieno.

Cl.- Ni vere troviĝis en feria atmosfero, kvankam ni sekvis sufiĉe labor-plenan restadon. Por bone profiti pri la instruado, estis necese dediĉi ĉiuvespere po unu aŭ du horojn al la asimilado de la lernitaĵoj. Tion ni povis fari en agrablaj ĉambretoj. Por la manĝoj ni povis viziti du memservajn studentajn restoraciojn, kaj la kursoj disvolviĝis en seso da klasejoj, kiuj estis situantaj en tria modernega konstruaĵo.

A.- Tiun idealan kursejon povis akiri la Organiza Komitato dank'al la influo de sia prezidanto, Ernest Natalis, emerita profesoro de la Ŝtata Universitato en Lieĝo.

Cl.- Ni povis elekti inter du programoj : lingvistiko kaj medicinaj sciencoj. Fakte ni ĉeestis tiujn kursojn por instruiĝi pri lingvistiko. Jen la nomoj de niaj profesoroj kaj ties instru-temoj :

A.- El Budapeŝto venis doktoro István Szerdahelyi, profesoro pri esperanto en la Universitato Eötvös Lorand. Li donis kurson pri ĝenerala lingvistiko.

Cl.- El la Universitato Saarbrücken, Germanio Okcidenta, venis du profesoroj : Sinjoro Heinz Maas, esploristo pri komputa lingvistiko, gvidis kursojn pri matematikaj metodoj en lingvistiko kaj komputa lingvistiko. Sinjoro Reinhard Haupenthal, instrukomisiito pri esperantologio, parolis pri la ĝisnunaj atingoj sur la kampoj esperantologio kaj interlingvistiko. El Londono venis doktoro John Wells, leksiisto pri fonetiko. Li donis tre interesan kurson pri tiu fako. Kaj fine el Usono venis doktoro Richard Wood, profesoro pri pluraj lingvoj en la Universitato de Bâton Rouge, ŝtato Louisiana. Li prelegis pri la piĝinaj kaj kreolaj lingvoj.

A.- Tre riĉa programo. Eble eĉ tro riĉa. La tempo tro rapidis. La nombro de la instru-horoj ne estis sufiĉa por elĉerpi la kursmaterialon. Tagon post tago ni malkovris vastajn horizontojn, pri kiuj ni estis ĝis nun nesciantaj. Vere riĉigaj ferioj, kaj ni tre bedaŭras, ke la venontan jaron ne disvolviĝos similaj kursoj en la sama aŭ en alia universitato. Praktiki esperanton en simila etoso jen idealo, al kiu ni jam de longe sopiris kaj kiu subite realiĝis.

Cl.- Jen kelkaj informoj pri la medicina fako. El Norvegio venis sinjoro Carl Stop-Bowitz, docento pri zoologio en la Universitato de Oslo. Ni havis la okazon aŭdi kelkajn el liaj interesaj lecionoj pri biologio. El Japanio venis du profesoroj : sinjoro Tomoo Nakayama, direktoro pri la Anatomi-Instituto en la Nihon-Universitato en Tokio, kiu instruis pri la homa anatomio, kaj sinjoro Sakutaro Tadokoro, profesoro pri farmakologio en la Gunma-Universitato en Showamachi, pritraktis la temon Civilizo kaj nuntempa sanstato. El Belgio venis sinjoro Wim de Smet, docento pri veterinara anatomio en la Universitato de Antverpeno. Pri kompara anatomio kaj homa histologio li instruis.

A.- La sola manko troviĝis flanke de la studentoj, kiuj ne estis sufiĉe multnombraj kaj estis tro diversnivelaj. Ni verŝajne estis nur la triono de la dezirata kaj ideala nombro. Inter ni preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj kaj kelkaj amerikaj landoj estis reprezentitaj. Tio montras, ke se la Someraj Universitataj Kursoj ne povis atingi vastan publikon, ili tamen interesis esperantistojn el tre diversaj landoj.

Cl.- La organiza komitato antaŭvidis, ke por fariĝi studento en la Someraj Universitataj Kursoj oni devas unuflanke esti abiturientulo, kaj aliflanke ne esti pli maljuna ol kvardek jaroj. Fakte la duono de la partoprenantoj estis pli maljuna ol tiu aĝ-limo.

A.- Por la profesoroj la ĉefa malfacilaĵo estis nia diverseco. Ekzemple en la lingvistika fako troviĝis lingvistoj, kiuj deziris plifakiĝi, ĉefe koncerne la esperanto-nomenklaturon. Aliflanke troviĝis gelernantoj, kiuj volis lerni pri lingvistiko. Tio estis nia situacio. Tria grupo estis formita de studentoj, kiuj profitis tiun okazon por lerni esperanton.

Cl.- Ni opinias, ke laŭ la nunaj cirkonstancoj la organiza komitato plenumis veran miraklon. Ni tre esperas, ke tiu miraklo reenkorpiĝos en novajn eksperimentojn, tio ĝis kiam la esperantistoj posedos veran universitaton, kie ili povos lingve lertiĝi kaj samtempe riĉiĝi en plej diversaj fakoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!